

junamiko

33a jaro, n-ro 3/2006 (117)

DECI

INTERNAC

REVUO DE ILEI POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

IJK-anoj de la jaro 2006 en Pizo

**Nia nova generacio certe venkos.
Ja ĝi povas rektigi eĉ la Pizan turon!**



**Pri Infanaj Kongresetoj (IJK, EJK) kaj
aliaj porinfanaj aranĝoj en 2007 informiĝu en
<http://bertosch.free.fr/2007>**

Joe Bazilio



www.imagufilmo.org

GERDA

MALAPERIS

la filmo

**Furorverko de
Claude Piron,
filmita de brazilaj esperantistoj.**

**Mendu DVD-on:
mendoj@imagufilmo.org**



VORTOJ DE ZAMENHOF pri patriotismo

Memore al la naskiĝ-tago de Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto kaj pro liaj noblaj vortoj ĉiam ankoraŭ aktualaj (bedaŭrinde), ni publikigas lian paroladon el la plej furora lernolibro de la Internacia Lingvo „Paŝoj al Plena Posedo” de William Auld tiel memorante ankaŭ pri ĝia mond-fama aŭtoro, kiu por ĉiam forlasis nin ĉi-septembre. Ni neniam forgesos ilin!

La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismon kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon inter la popoloj, kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro! Dum la pseŭdo-patriotismo, t.e. la genta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti



malamikaj inter si. Ĉiu povas paroli al ni pri ĉiuseca amo, kaj ni kun danko ilin aŭskultos; sed kiam pri amo al la patrujo parolas al ni ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo – tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton „amo”, ĉar en via buŝo la sankta vorto „amo” malpuriĝas.

Ho, patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon alĝuiĝi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis!

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la na-

turo, kiuj ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn ni vidas nun en tiu ĉambrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata, estas „esperantistoj”.

abomeni: malamegi, malrespekti / *aktuala*: ankaŭ nun-tempe valida / *demono*: malbonvola diaĵo / *egoismo*: mem-amo / *fibro*: muskoloro, fadenero / *furora*: plej sukcesa, laŭmoda / *gento*: arego da sam-devenuloj / *glui*: alfiksi per duon-flua materio / *indigno*: kolero pro ies misago / *iniciati*: kiel unua proponi, fari / *kalumnii*: intence malutili al ies honoro / *patriotismo*: amo al patrujo / *prediki*: insiste rekomendi / *pseŭdo*:- ŝajn-, mis- / *sovinismo*: malamo al ali-gentanoj, alinacianoj / *trakti*: prikonsideri.

William Auld (1924-2006)

EKLOGO PRI LA SANKTA AFERO

(Fragmento)

Ĉu vi ne konas tiun senton sanktan,
 kiu la disan rason esperantan
 je unu firma familio fandas?
 Kun miro kaj konsterno mi demandas:
 ĉu vi ne kredas, ke l' esperantismo
 povas la mondon savi de l' abismo?
 Kiel kutime, nia Majstro pravis –
 tial, ke li klarvidan fidon havis
 pri la kuracefiko radikala
 de lingvo tuthomara kaj neŭtrala
 al la sanganta suspektema mondo.
 Ni estas fakte familia rondo:
 kaj se kverelas ni – frat' fraton batas –
 nu, kiel ĉiuj fratoj ni rilatas,
 kiuj kverelas kaj pardonas poste,
 ĉar parencaro estas ni ĝisoste.

Gratulon!

Tutmonda Fabelkonkurso por infanoj 2006

Rezultoj:

Kategorio A

- 1, 2. ne aljuĝitaj.
3. *Pri leporeto*; Jan Bauer, Ĉeĥio
Kateto; Jitka Rybkova, Ĉeĥio




Kategorio B

- 1, 3. ne aljuĝitaj.
2. *Neĝulo*; Denisa Pavlisova, Ĉeĥio


Kategorio C

1. *Kial havas testudo kirason*; Eliska Splichalová, Ĉeĥio
2. *Vulpino kaj leporo*; Nikola Janouskova, Ĉeĥio
Aventuro; Eliska Sidlikova, Ĉeĥio
3. *Dorlotita katino*; Karolina Silarova, Ĉeĥio



Kategorio Grupoj

1. *La tri herboj*; Gretel Schumann, Francio
Aniko Slezák, Hungario
Alina Calibe Bruegger, Germanio
Aniko Lilla Hegedűs, Hungario
2. *La fabelo de Anĝela kaj Cedrik*;
Chaira Coethals, Belgio
Alice Larue, Belgio
Alina Calibe Bruegger, Germanio
3. *Historio de jasmeneto*;
Melissa Morales Sousa, Kubo
Eliany Hernandez Amaya, Kubo
Mainu Garcia Lazaria, Kubo
4. *Aventuro el la lando de musoj*;
Adam Macku, Ĉeĥio
Michal Fukar, Ĉeĥio



La premion **Fabelo Internacia** gajnis la grupa konkursaĵo *La tri herboj*.

➤ KIAL HAVAS TESTUDO KIRASON ◀

(En 2006 ĝi ricevis la unuan premion en kategorio C)

Granda dio Zeŭso estis la reganto de ĉiuj grekaj dioj. Li havis grandan aŭtoritaton kaj ofte havis malbonan humoron. Tiam li ĉirkaŭĵetadis fulmojn kaj la aliaj dioj timis lin.

En iu tago Zeŭso invitis ĉiujn bestojn al sia solena edziĝ-festo. Kiam alvenis tiu grava tago, la bestoj rapidis al la festa aranĝaĵo. Sciuj, ke ĉiu-tage laŭ siaj deziroj ili povis manĝi siajn plej ŝatatajn manĝaĵojn.

Zeŭso rigardis ilin kaj gaje ridetis. Poste, li subite eknubiĝis: "Kie estas la testudo?" demandis li al Hera, sia nov-edzino. "Kial ĝi ne estas ĉi tie?"


Ankaŭ la diino Hera rimarkis, ke la testudo ne alvenis.

"Morgaŭ mi demandos ĝin", diris Zeŭso.

Kaj en la sekva tago Zeŭso trovis la testudon, kiu trankvile ripozis sur kota bordo de rivero.

"Testudo, kial vi sola el ĉiuj bestoj ne venis al mia edziĝ-festo? Respondu!" ripetis Zeŭso.

La testudo levis la kapon kaj flustris per mallaŭta, timema voĉo: "Ĉie estas bone, sed hejme plej bone." Zeŭso koleriĝis. Li tiel laŭte ekkriis, ke la timigitaj birdoj kun bruo elflugis el la ĉirkaŭaj arboj. "Nu, se estas tiel, vi ĉiam portos, do, la domon kun vi ĉien, kien vi iros!"




Kaj tuj poste kun granda tondro kaj blindiga fulmo malaperis Zeŭso. En tiu momento la testudo jam sentis, ke io pezas sur la dorso.

Estis firma, peza kiraso, kiu ĝin tute kovris. La testudo paŝetis for. Videblaj estis nur la skvama kapeto, la pinto de la vosto kaj la kvar fleksitaj piedoj.

De tiu tempo ĉiu testudo de la mondo senĉese portas sian dometon sur la dorso.

Eliska Splichalová, Ĉeĥio



aŭtoritato: respekto al iu pro ties altaj kvalitoj kaj povo / *flustri*: paroli apenaŭ aŭdeble / *kiraso*: fortika korpo-ŝirmilo / *koto*: tero mola pro akvo / *skvamo*: kovrilo de fiŝo-korpo, simila al monereto / *solena*: farata laŭ ne ordinaraj, festaj reguloj / *testudo*: vidu la bildon.



HELPANTA MANO



Mi ne deziras paroli pri la graveco de la vivo..., sed mia koro ofte malgaj-
iĝas aŭdante pri malbon-agoj de homoj. Ĉefe, se la fiago okazas proksime al
mi, eĉ en mia amika rondo.

Okazis antaŭ unu jaro kaj duono, ke en iu tago fraŭlino Eva, unu el miaj ge-
lernantoj telefone vokis min plorante: „Julinjo, ĉu vi povus min helpi?!”

Ŝi estis tiam 25-jara, studentino en universitato kaj ĝuste tiam akiris mez-
gradan diplomon pri Esperanto. Lernante ĝin ŝi ekŝatis Esperanton, kaj ni iĝis
bonajamikinoj. Kompreneble, mi tuj invitis ŝin al mi por preparoli ŝian proble-
mon. Ankaŭ ŝia patrino venis kaj ili rakontis pri sia malbonega sorto: la
patro forpelis ilin el la hejmo....

Mi ne volas detale prezenti iliajn problemojn, sufiĉas scii, ke post
eksedziĝo de la gepatroj, ĉi-somere la tribunalo decidis favore al la patrino
de Eva.

Poste, en iu nokto ŝia patro revenis, bruligis ilian hejmon kaj Eva restis
inter la flamoj.... Estis terure! Tiu-tempe mi somerumis kun miaj esperant-
istaj geknaboj en internacia tendaro de Herzberg. Nia komuna amiko nerve-
ze informis telefone pri la teruraĵo! Mi ne volis kredi....

En la sekva tago ni revenis hejmen, kaj mi tuj telefonis al la hospitalo,
demandis la kuraciston pri la stato de Eva. Ŝi vivis, dank' al Dio, sed ŝia
korpo-surfaco estis bruligita 60-procente! Ŝi kuŝis en Budapeŝto, en inten-
siva sekcio kaj estis jam post unu operacio, kaj atendis la duan. „Nur estas
iu granda problemoj!” diris la kuracisto, „Estas malmulte da sango por ŝi!” Mi
ne hezitis tuj skribi perrete al miaj budapeŝtaj amikoj, kaj sam-tempe dis-
sendi mallongan mesaĝon al la hungaraj esperantistaj instruistoj kaj peti ilin
doni sangan por Eva, por ke la kuracistoj povu ŝin operacii!

Okazis miraklo! Jam sekva-tage venis la unua esperantisto, poste aliaj, kaj
esperantistoj, kaj miaj amikoj, kiuj loĝas en Budapeŝto, aŭ proksime al la
ĉefurbo, kaj donis sangan!

Post kvin operacioj Eva jam estas hejme, mi ofte vizitas ŝin! Ŝi jam denove
povas babiladi kun siaj geamikoj, kiuj estas ĉefe esperantistoj. Sed ŝia vivo
jam neniam estos tia kiel antaŭe...

Eva (kaj ankaŭ mi) dankas pro ĉies bonkora helpo, kiu savis vivon!!!

Juliana Vas-Szegedi, Tiszafüred (Hungario).

Kion faras glaci-rompaj ŝipoj?



Glacirompuloj estas ŝipoj, kiuj kapablas rompi dikan sur-maran glaci-kruston. Ili malfermas trairejojn tra glaci-kampo, kaj dum severa frostoj antaŭiras aliajn ŝipojn, kiuj ne povus atingi nordajn havenojn sen ilia helpo. Finnlando havas naŭ glacirompajn ŝipojn. Bildojn de kvar el ili oni vidas sur kvar poŝt-markoj eldonitaj en septembro 2005 (vidu ilian foton ĉi-supre!). La labor-sezono de ĉi tiuj ŝipoj kutime daŭras de decembro ĝis la fino de aprilo, sed iuj vintroj estas multe pli mildaj ol aliaj, kaj tiam oni apenaŭ bezonas iliajn servojn.

Glacirompaj ŝipoj uzas dizelan oleon, elektron aŭ nuklean energion. La nuklea glacirompulo Artika estis la unua surmara ŝipo, kiu iris ĝis la Norda Poluso en 1977.

La plej novajn finnajn glacirompajn ŝipojn oni konstruis tiel, ke ili povas plenumi multajn taskojn: prizorgi nafto-kampojn kaj bor-staciojn en la maro, meti tubojn kaj komunikajn kablojn sur la mar-fundo, levi kaj elakvigi pezegajn aĵojn de sur la fundo, k.t.p.

Post 30-jara laborado unu el la malnovaj finnajn glacirompajn ŝipojn estis ŝanĝita en turisman aventur-ŝipon, kiu veturigas homojn por 4-hora krozado en arktaj kondiĉoj dum decembro-aprilo kaj kiun somere oni uzas kiel konferenc-ejon, restoracion kaj festejon. Ĝi nomiĝas Sampo kaj ĝia hejmhavento estas ĉe la urbo Kemi.

www.sampotours.com
(prezento en dek lingvoj)

www.finstaship.fi
(prezento en la finna, sveda kaj angla)

Saliko, Finnlando

arkta: nord-polusa / dizelo: tipo de motoro / krozi: ŝip-veturi / krusto: malmoliĝinta supraĵo / nukleo: atom-kerno / poluso: iu el la du ekstremaj punktoj de la ter-globo.

Birbal revenis hejmen

Birbal, la fama, sprita kaj saĝa ministro de reĝo Akbar en Hindujo, iris al Irano, je la invito de ties reĝo. Honore al la gasto la irana reĝo bone akceptis Birbalon kaj regalis lin per luksaj kaj grandiozaj festoj. Krome, li superŝutis la gaston per valoregaj donacoj.

En la vespero antaŭ la reiro de Birbal, irana nobelo demandis al li, kiel li komparas la irananojn kun sia reĝo. Birbal respondis:

“Via reĝo estas kiel plena luno, dum la mia similas al kvarona luno.”

Tia respondo ege plaĉis al la irananoj.

Sed!!!

Jen kio okazis, kiam Birbal revenis hejmen!

Lia reĝo, Akbar eksplodis de furiozo jene:

“Vi, perfidulo! Kial vi aĉe malestimis vian propran reĝon?”

Birbal trankvile respondis:

“Via reĝa moŝto, mi ne insultis vin; male, alte taksis vin per kripta malkaŝo de mia opinio. Nu, la plena luno grade malkreskas kaj fine malaperas. Kontraŭe, la kvarona luno tagon post tago kreskas. Mi nur volis proklami al la mondo, ke via povo kreskas de tago al tago, dum tiu de la irana reĝo estas malpliigonta iom post iom.”



Akbar iom honteme bon-venigante ĉirkaŭbrakis Birbalon varmkore.

S-ino Saranath, Hindio

eksplozi: subite kaj forte ekbrui / *furioza*: kolerega / *grandioza*: ne ordinare granda / *kripta*: enigma, kaŝita / *ministro*: fakestro en registaro / *nobelo*: alt-rangulo en feŭdismo / *perfid*: ĉesi esti fidela / *proklami*: oficiale anonci / *regali*: doni al invitito bon-gustajojn.

La sekreto de Aranka

(Tajna* legendo el Kubo)

En tajna vilaĝo, ĉe la bordo de la rivero Kaŭto, loĝis knabino nomata Aranka. Ŝi havis nigran hararon similan al la flugilo de la nigra birdo Totio. Ŝi moviĝis tiom gracie, kvazaŭ fluganta papilio. Okazas, ke ŝia nomo en tajna lingvo signifas papilion.

En la vilaĝo loĝis ankaŭ juna tajno nomata Ĝvabaĉjo. Li estis soldato kaj enamiĝis al la belulino Aranka. Tiun senton ŝi rapide akceptis. Sed ili estis kune videblaj nur dumnokte. Do, ekde kiam la suno aperis, Aranka malaperis kaj ne revenis antaŭ la nokta luno.

Iun nokton okazis festeno en la vilaĝo. Ĉiuj kantis kaj dancis ĝis la mateno. Kiam Aranka antaŭvidis la sun-leviĝon, ŝi volis foriri, sed Ĝvabaĉjo retenis ŝin dirante:

„Kial vi foriras? Mi deziras, ke vi restu por ĉiam kun mi.”

„Ne povas esti. Se mi ne foriras, vi neniam plu vidos min”, respondis Aranka.

„Kial?” demandis Ĝvabaĉjo.

„Venu kun mi, kaj mi rakontos mian sekreton al vi”, diris la knabino kaj komencis kuri ĝis proksima kampo kun multaj sun-floroj. Tie ŝi prenis lian manon kaj rakontis al li:

„Kiam mi estis infano, sorĉistino

punis mian patron, ĉar li ne volis donaci al ŝi perlan kol-ringon, kiu estis destinita por mia panjo. La puno estas, ke ĉiu-tage, ekde sunleviĝo ĝis sun-subiro mi estas sunfloro. Nur dumnokte mi estas denove knabino.”

„Kaj kion ni povas fari por malaperigi tiun sorĉon?” demandis la junulo senpacience.

„Tiu, kiu amas min, devas froteti per la fingro-pintoj mian petalon. Sed li devas unue malkovri, kiu el la multegaj sunfloroj estas mi. Se li eraras pri la floro, li neniam vidos min plu, kaj mi restos sunfloro por ĉiam. Faru nenion, Ĝvabaĉjo. Se vi eraras, estus pli malbone por ni. Ĝis la nokto!”

La bel-aspekta junulo rigardis atente sunfloron post sunfloro, kaj tre zorgeme li karesis la petalon de unu el ili, kaj... Aranka aperis.

La sorĉo estis rompita. La du geamantoj gaje brakumis sin reciproke. Jam survoje, la junulino sci-vole demandis al Ĝvabaĉjo:

„Kiel vi divenis, ke ĝuste tiu sunfloro estis mi?”

„Tre facile. Ni dancis kune dum la tuta nokto. Pro tio, vi estis la unua sunfloro, kiu ne havis roson sur via petalo.”



Elhispanigita de
Jozefo de Jesús Campos Pacheco
kaj *Vilhelmo Lutermano*, Kubo

* Tajno estas indiana tribo de kubaj praloĝantoj (kiujn grand-parte ekstermis la eŭropanoj venintaj al Kubo).

ANEKDOTO

Kiam Mark Twain estis la ĉefredaktoro de iu gazeto, li resendis manuskripton al juna verkisto kun jena noto:

„Estimata sinjoro! Natur-esploristoj instigas verkistojn manĝi fiŝojn, ĉar ili enhavas fosforon por la cerbo. Nun mi ne povas diri, kiom da fiŝoj vi devus manĝi, sed se la manuskripto, kiun mi ĉi-kune resendas, fidele ilustras, kion kaj kiel vi kutimas verki, mi kuraĝas rekomendi, ke du mez-grandaj balenoj estos la ĝusta kvanto.”

baleno: la plej granda mar-besto / *manuskripto*: preta, sed ne aperigita verko de aŭtoro.

Solve de enigmo p. 47, n-ro 2/06: Unue transporti la kapron, poste la herbon kaj reporti la kapron, transigi la tigron kaj fine denove la kapron. Estas simple, ĉu ne?

REBUSOJ

Ni kaŝis kelkajn el niaj 1500 vortoj en la subaj rebusoj. Ne ektime, kuraĝe aliru! Ni celis fari al vi ne kapo-rompajn tasketojn. Ek! La solvoj aperos en la sekva numero.

1 klr

2 ooo n

3 , d *

4 L
2


5  M

6 ~~2~~ be

7 ti ti ti k

8 h' / t

9 bb

10 

11 i
te

12 b 0

* Ĉi tiu vorto ne troviĝas en nia vort-listo.

Geza Kurucz



SUNO

kaj

NOKTO

La moderna mondo daŭre pelas nin al ŝablonaj solvoj: "Ĉu vi ne dormas? Prenu dormigilon!"

Sed kial? De tempo al tempo estas kvazaŭ agrable aŭ eĉ necese resti sen-dorma la nokton kaj sperti aferojn, kiujn dormanto ne povas koni.

La nokto estas mistera kaj ĝuste pro tio ĝi estas koninda, kiel deziras eĉ Suno en ĉi tiu antikva hinda legendo:

Tera homo vizitis Sunon.

– Kiel pasas la aferoj tie sube – demandis lin la granda astro.

– Bone, via Moŝto! Ĉiuj adoras vin.

– Ĉiuj? Ĉu vere?

– Nu, via Moŝto ... ekzistas nur unu tre bela virino, kiu neniam turnas sin al vi

– Kaj kiu estas ŝi?

– Ŝi nomiĝas "Nokto".

Suno iĝis scivolema.

– Kaj kie loĝas ĉi tiu virino?

– En Hindio, via Moŝto.

Suno tuj ekkuras al Hindio.

Sed la virino, sciante ke li baldaŭ alvenos, foriras al alia parto de la mondo.

Suno ŝin postkuras, sed vane.

Eĉ hodiaŭ Suno postsekvas tiun belan virinon, atingante ŝin neniam.

Tradukis: *Tulja Spaĝĝari (itale: Tullia Spaggiari) el Correggio, Italujo*

LA TRADICIOJ

Baldur Ragnarsson *de popoloj*

Islanda sporto: GLIMA

Kiam mi estis 12-jara, vizitis mian lernejon juna homo komisiita de la edukaj instancoj por instrui la islandan tradician lukto-sporton, nomitan *glima*. Mi partoprenis tiun kurson kun entuziasmo, kiu neniam tute min forlasis. Tial mi ŝatus iom paroli pri tiu sporto, la sola kiun oni rajtas nomi speciale islanda.

La islanda vorto *glima* parenkas al vorto signifanta ludon, gajon, amuzon. La sporton mem karakterizas malpezeco, kiu multe similas dancon. Du homoj frontas unu la alian, man-preme intersalutas, kaptas reciproke la specialajn zonojn uzatajn dum la *glima*, komencas paŝeti en konstanta rond-irado dancosimile, sam-tempe provante faligi unu la alian per specialaj artifiko de piedoj, kruroj kaj koksoj. La konkursantoj tenas sin rektaj, estas malpermesite kaŭzi aŭ eviti faligon per korpa kurbigo kaj muskola forto. Bele plenumata *glima* estas gracia afero por rigardi, neniel simila al luktoj de batalado per solaj korpaj fortoj (bokso, pankraco, k.s.).

Konkursado okazas en tri pezo-grupoj: malpeza, meze peza kaj superpeza. Konkursantoj surhavas specialajn zonojn kaj prenas ilin reciproke laŭ specialaj reguloj (t.n. *glima*-prenoj). Ili devas konstante sin movi rond-paŝe (*glima*-rondpaŝado), kun rektaj korpoj kaj ne lasi la *glima*-prenojn. Tiu venkas, kiu sukcesas faligi la rivalon tia-maniere, ke tiu tuŝas la grundon per aliaj korpaj partoj krom brakoj kaj kruroj aŭ kun ambaŭ manoj postdorse. Konkursa aranĝo estas du-speca: inter du grupoj kaj inter individuoj.

Islanda *glima* supozeble evoluis el luktaj ludoj popularaj en Norvegujo antaŭ la ekloĝado de Islando en la 9-a kaj 10-a jarcentoj. Tut-landa konkursado okazis por la unua fojo en 1906. Islandaj *glima*-luktantoj prezentis la nacian sporton en la Olimpiaj ludoj 1908, kaj tio estis la unua vojaĝo de islandaj sportistoj al eksterlando. La *Glima*-asocio de Islando (fondita en 1965) estas membro de la Sporta Asocio de Islando. Antaŭe nur viroj partoprenis *glima*-konkursojn, sed lasta-tempe ankaŭ virinoj komencis okupi sin pri tiu sporto.

La ĉefaj artifiko de la *glima* estas la jenaj:



1



2



3



4



5



6



7



8


1. **Krura sving-puŝo.** Interna flanko de kruro sur eksteran flankon de rekte kontraŭa kruro.
2. **Pieddorsa hoko.** Pieddorso kroĉas malantaŭ diagonale kontraŭan piedon.
3. **Genua svingpuŝo.** Interna flanko de kruro sur eksteran flankon de rekte kontraŭa genu-kavo.
4. **Kalkana hoko.** Kalkano kroĉas malantaŭ rekte kontraŭan aŭ diagonale kontraŭan piedon.
5. **Flank-svingo.** Piedo alflankita malantaŭ diagonale kontraŭan piedon.
6. **Flanksvingo en aero.** Femuro aŭ kokso sur diagonale kontraŭan femuron aŭ kokson en aero.
7. **Interkrura levo-svingo.** Genuo kaj femuro sub kontraŭan femuron.
8. **Koksa svingo.** Kokso kontraŭ diagonale kontraŭa kokso.

artifiko: lerta ag-maniero, per kiu iu surprizas alian / *diagonalo*: / / *entuziasmo*: arda emo al io / *fronti*: stari unu kontraŭ alia / *hoko*: kurbigita metal-peco aŭ tia-direkta movo en sporto / *instanco*: decido-pova gvidantaro de aferoj / *kokso*: iu el la du malsupraj eksteraj flankoj de korpo-trunko / *komisii*: peti iun plenumi ion kaj respondeci pri ĝi / *rivalo*: tiu, kiu volas superi alian al li similan / *svingi*: (energie) movi tien reen.

Konversaciaj temoj

help-materialo
por ekzamenotoj

Rubrikestro: Judit Felszeghy



– Saluton, Anjo! Rigardu eksteren, kiel bela vintra vetero! Ni eliru ien!

– Saluton, Vera! Nun mi spektas artan sketadon en televido...

– Prefere venu kun mi, ni vizitu la urban glitumejon!

– Ne, mi ne povas, mi timas glit-fali.

– Do, bone. Sen vi mi ne iros tien. Sed mi havas novan ideon: ni iru sledi! Mi ricevis novan sledeton, mi garantias, ke vi ne falos de sur ĝi!

– Ba!... mi ne vere deziras sledi! Neĝo enŝoviĝos sub mian ŝalon, vestaĵon, post dek minutoj mi aspektos kiel neĝo-homo!...

– Ho jes! Bonege! Jen nova propono: ni konstruu neĝohomon! Ni restos ĉi tie, sur la strato! La afero estas simpla, ni ekrulos neĝo-pilkon, kiu pli kaj pli dikiĝos, ĝis fine ĝi fariĝos la ventrego de la neĝohomo, poste ...

– ... kaj oni ĵetos neĝ-bulojn kontraŭ nin!...

– Kiu „oni“?

– La knaboj sur la strato. Krome, de sur la arboj neĝo-flokoj falos sur la kapon, mi certe malvarmumos. Mi tute bone fartas enĉambre kaj iros nenien.

Ĉu vi ŝatas vintrajn sportojn? Kiujn (art/glitumadon, skiadon, glacihokeon...)? Ĉu vi (nur) spektas ilin, aŭ ankaŭ praktikas tiujn sportojn?

– Ha-lo, Ĉu Anjo? Parolas Roberto.

– Saluton, Berto, kiun programon vi havos dum la ferioj?

– Postmorgaŭ ni veturos al la montoj por iom skii. Ni restos tie kelkajn tagojn.

– Ankaŭ mi volis demandi al vi... Ĉu mi povos iri kun vi?

– Jes, certe. Sed ĉu vi scias skii?

– Ankoraŭ ne, sed mi decidis lerni tion ĝuste ĉi-vintre!



Ĉu vi planas skiadon en la vintraj ferioj? Ĉu vi iros sola aŭ kun viaj geamikoj? Ĉu vi jam invitis ilin? Se ankoraŭ ne, preparu – skribu kaj desegnu – belan invitilon! Ne forgesu menciin, kiu-cele vi veturos, kien (aldonu ankaŭ precizan adreson), por kiom da tempo, kiam vi ekveturos, kie, je kioma horo estos la renkontiĝo! Vi povas sendi invitilon ankaŭ al nia redakcio!

- Vera kara, mi petas vin helpi al mi! Kion kunpreni por kelk-taga skiado?
– Plej gravas la iloj! Ĉu vi havas ilin?
– Roberto pruntos al mi skiojn kaj ankaŭ ski-bastonojn. Ŝuojn mi hieraŭ aĉetis. Rigardu ilin, ili ja estas taŭgaj, ĉu ne?
– Jes, tute bonaj, kun la necesaj ligiloj. Mi eĉ ne imagis, Anjo, ke vi tiom entuziasmiĝas pri skiado!...
– Ho jes! Vintraj sportoj ĉiam interesis min!

Tamen, Vera ne diris al Anjo, ke krom la sportiloj kion ŝi ankoraŭ paku en la valizon...

Ĉu vi povus helpi ŝin? Faru liston pri la necesaj vestaĵoj, ceteraj aĵoj, eventualaj dumvojaĝaj manĝaĵoj! Estu atenta, forgesu pri nenio grava, sed konsideru ankaŭ, ke Anjo ne havu tro pezan valizon!

floko: peceto el malpeza materio / garantii: preni sur sin la respondecon; esti tut-certa pri io / sketi: glit-kuri, glitumi / skii: glit-kuri sur neĝo per longaj mallarĝaj tabuloj / sledo: glit-veturilo.



LUME

LA UNUA MIRINDA ETAĜO



Rubrikestro:
Mónika Molnár
Ĝepatroj, instruistoj,
bonvolu legi ĉi tiujn
paĝojn al etuloj!

La festego

- Bim-bam, bim-bam, bim-bam - aŭdis Kontentulo iun matenon. Li rapidis, eĉ rapidegis al la enirpordo kaj malfermis ĝin. Estis Rapidulo, la poŝtisto.

- Saluton! Mi estas Rapidulo, la rapidega poŝtisto kaj mi serĉas Kontentulon. Kiu vi estas?

- Saluton Rapidulo, mi estas Kontentulo. Ĉu vi portis ion por mi?

- Jes! Mi havas dikegajn leterojn por vi. Ĉu vi kontentas?

- Ho, mi kontentegas! Kiu skribis al mi?

- Atendu, mi tuj legos ĝin al vi. Unu letero venis el Svislando de Aîlèn, kaj la alia ... ankaŭ ĝi venis el Svislando, kaj ĝin skribis Lucie. Bonvolu subskribi la registron ke vi ricevis ilin.

- Subskribo: *Kontentulo*. Jen ĝi. Multajn dankojn kara Rapidulo.

- Nedankinde kaj ĝis revido!

- Ĝis revido.

Kontentulo rapidege malfermis la kovertojn unu post la alia kaj estis tre tre kontenta pri iliaj enhavoj. Li tuj prenis la telefonon kaj vokis sian amikon, Elegantulon. „Venu, venu Elegantulo, mi havas surprizon por vi!” La amiko tuj venis.

- Saluton Kontentulo, kio estas tiom urĝega? Ĉu vi forgesis ke baldaŭ estos la festego kaj ni havas multegan laboron?

- Saluton Elegantulo. Ne, mi tute ne forgesis tion kaj ĝuste pro tio urĝegas la afero. Ni ricevis grandegan helpon! Rigardu kio alvenis hodiaŭ per la poŝto de du amikinoj. Jen helpego! Rigardu:



- Mirindege! Dank'al la du knabinoj, ni povas sendi variajn invitkartojn al niaj amikoj kaj amikinoj. La kuiristino jam preparis kelkajn pladojn kaj nun cerbumas pri iu deserto...

- Deserto? Ho, rigardu, estas ankoraŭ folioj en la koverto. Eble... Jes! Ailèn sendis al ni ankaŭ recepton por deserto!

- Ĉu vere? Bonege! Ni legu ĝin:

Njam-njam...

Ĉoko-pomo


Por fari ĉ. 30 pecetojn vi bezonas:

- 100 gramojn da rondaĵetoj de sekigitaj pomoj
- pikstangetojn el ligno
- 1 tableton da ĉokolado

Metu pomo-rondaĵetojn sur la pikstangetojn, turnu ilin en la fondita ĉokolado kaj lasu ilin sekiĝi ĉ. 5 horojn. En freŝa kaj seka loko vi povas konservi ilin dum 2 semajnoj. Bonan apetiton!

Nu, restas ankoraŭ la dekoracio de nia grandega festosalono.

- Ne timu, Elegantulo, niaj du diligentulinoj zorgis ankaŭ pri tio! Rigardu, legu kaj ni eklaboru laŭ iliaj instrukcioj!




Por la lampiono vi bezonas krepnan paperon (ekz. oranĝan kaj flavan) kaj dratojn.

1. Vi devas fari globforman skeleton el la dratoj. 2. Vi devas tondi striojn el la flava krepa papero. 3. Poste tonda el la oranĝa krepa papero robon por la skeleto kun unu truo supre (por povi

enmeti la ampolon). 4. Gluu tiun ĉi robon sur la drato-skeleto. 5. Fine gluu la flavajn striojn sur la oranĝan kiel videblas sur la bildo.

Por la girlando vi bezonas nur krepnan paperon je du diversaj koloroj (ekz. ruĝa kaj verda). Tonda longajn striojn el ambaŭ koloroj. Kunĝluu la du kolorojn laŭ la bildo. Poste faldu la ruĝan sur la verdan kaj poste la verdan sur la ruĝan kiel montras la sagoj. Refaru tiujn ĉi movojn ĝis kiam vi ne plu havas faldeblan strion. Fine kunĝluu ankaŭ la du finajn ekstremaĵojn.



- Do, restas al ni nur elkore danki la helpegon kaj komenci la feston. Estu ankaŭ vi nia gasto!




Tasko: Ĉu vi povas diri al ni kiom-foje aperas en la teksto: mal-, -eg-, -ul- kaj -et-, -in- kaj en kiuj vortoj? 😊

ALUMETA-ALIMETO


TASKO 1 →

transmetu **tri** alumetojn por ricevi **tri** egale grandajn kvadratetojn.





TASKO 2 →

transmetu **tri** alumetojn por ricevi **sep** egale grandajn kvadratetojn.



TASKO 3 ↓

Jen unu trapezo. Aldonu **kvin** alumetojn por ricevi **kvar** egale grandajn trapezojn.



TASKO 4 →

Forprenu **ses** alumetojn por ricevi **kvin** kvadratojn.

KELKAJ FORMOJ:

Cirklo



Kvadrato



Rombo



Rektangulo




Triangulo



Deltoido



Paralelogramo



Trapezo



Strangaj simboloj

"Mi trovis la solvon!" krias Sandra: "Por nomi planedaron: tio estas SUN-SISTEMO!"

"Vi pravas," diras Roberto: "ĉiu muro donas literon por tio."

Do, ili prenas la brikojn el la muroj kaj plenigas la dek truojn. Tuj kiam la lasta briko eniris sian lokon, ili aŭdis grandegan skrapan bruon. Partoj de la planko apartiĝas kaj malaperas. La esploristoj saltas for de tiu malaper-zono. Malfermiĝas parto de la muro kaj jen sekreta koridoro!

"Hura!" krias Karlo: "Ni sukcesis. Ni enkuru! Prenu lanternon!"

"Atendu!" avertas la sciencisto: "Eble estas kaptilo. Unue ni provu ĝin, ni enĵetu ŝtonon." Ili faras tion – tuj el la muroj flugas sagoj.

"Bone ke ni ne eniris tuj. Ni ĵetu duan ŝtonon."

Ili tion faras, sed nenio plia okazis. Do, ili eniras.


"Atentu, povas esti dua kaptilo." avertas Roberto, tuj antaŭ la sento de iu premo ĉe la maleolo. Ili proksimigas la lanternon kaj vidas ŝnuron, jam tiritan.

"Kaptilo!" krias Roberto: "Tuj reen!". Ĉiu forkuras.


Grandega ŝtono falas de supre, polvo flugas ĉien.

"Ĉu ĉiu estas en ordo?" demandas Sandra.

Ĉiu respondas jese. Ili grimpas tra eta spaco flanke de la ŝtonego kaj trovas tri strangajn simbolojn, kun malplena loko por kvara simbolo:



"Jen mi trovis ankoraŭ tri!" krias Roberto.



Sur mont' da spageto

en parodia kanto kiu furoris en usono en la sesdekaj jaroj. La originalo estas popola kanto kun nekonata aŭtoro. Por legi la originalajn anglajn vortojn vizitu www.kiddies.com/lyrics/o036.html. Por legi kaj aŭdi la parodion en la angla vizitu www.scoutsongs.com/lyrics/ontopofspaghetti.html.

Sur mont' da spageto
Kovraĵ' de fromaĝ'
Viand-bulo perdiĝis,
Pro tern' la domaĝ'!

De tablo ĝi falis
Al plank' kun *sklup*-far'
La bul' kompatinda
Tra pord' al ŝtupar'

Ruliĝis ĝardenen
Post arbusta pas'
Ekrestis da bulo
Nur kaĉâamas'

Sed kaĉ' ja bongustis
Bongustis eĉ pli
Do, fru-nov-somere
Al arb' kreskis ĝi.

La arbo kovriĝis
Per verd-muska mat'
Kaj ravgustaj buloj
Kun saŭc' de tomat'

Do, la moralo de ĉi tiu rakonto tekstas:

Manĝante spagetojn
Fromaĝ' en eksces'
Firmtenu la bulojn
Kun tern' malpermes'



La literoj indikas la gitar-agordon. Ni aperigos gitar-notojn por ĉi tiu kanto en <lernu.net>

trad. SMG

EMILIO

Saluton, legantoj! Ve, nur mi povas paroli kun vi. Erni malaperis. Mi puŝis lin en la tempo-maŝinon antaŭ 4 monatoj kaj li ne revenis.



Li ĝenis miajn lecionojn – li kantis dum mi kuiris, li miksis spacistojn kun egiptanoj, li detruis mian lav-maŝinon. Do, mi forsendis lin.

Sed li estas mia amiko kaj mi volas revidi lin.



Ĉu li iris en la estontecon aŭ en la pasintecon? Se al la estonteco, eble mi povos uzi poŝ-telefonon.



Saluton, ... Erni?

Dankon ke vi elektis Romikom. Bzz, klik!

Vi atingis la respond-aŭtomaton de Erni Greca. Mi estas ĉenita al grava tasko. Laboremo en la biremo. Mi respondos tuj kiam oni ĉesis vipi min.

Du horojn poste

Erni, kie vi estas?


En rem-boato. Biremo. Ie en la Mediteranea maro.

En kiu jaro vi estas?

Mi ne scias. Eble XXXVII.

Kien vi iras?

Al Romo. Ĉiuj vojoj iras tien.



Bedaŭrinde, Erni faliĝas sian telefonon...

Erni? Kun kiu mi parolas? Mi estas Emilo!



Redonu la aparaton al Erni mi petas.

Tiu alta plendulo?

Certe.



Kaj mi estas Remilo. Romia remilo, ho mia Emilo.



Erni, kial la aŭskultilon apud vian oreilon vi ne remetas?




Remetas? Remetas? Mi ne remetas! **Mi remegas!**







Se vi respondis A por 'La Piramidoj' vi malpravas. Jen vi sub zbruga atako kun nenio alia ol bunĝiboj por manĝi. Reiru kaj provu denove; elektu pli saĝan respondon.



Emil, kial vi ne aĉetis du-personan lav-maŝinon?



LONGECO GRAVAS

Jen la plej longa valida serĉadreso en la mondo. Provu ĝin! Multaj pretendas ke ĝi estas ankaŭ la plej longa loknomo en la mondo, kun 56 literoj:

Lanfairpwlglwyngyllgogerychwyrndrobwlllantysiliogogoch.com Ĝi estas kimra vilaĝo. La nomo signifas: La preĝejo de sankta Maria en la niĉo de la blankaj avel-arboj apud la rapida akvo-kirlo apud la ruĝa kaverno de la Sankta Tisilio. La nuna limo por ret-nomoj estas 63 karaktroj. Tio ne sufiĉas por la vilaĝo en la oriento de la norda insulo de Nov-Zelando kun maoria nomo, kun 92 literoj:

TetaumatawhakatangiHangakoauaotamateaurehaeaturipukaphimaungahoronukupokaiwhenuaakitanaorua

Ĝi signifas 'La monto-pinto kie Tamatea, kun ostecaj kruroj, kiu glitis kaj grimpis montojn, la granda vojaĝanto, sidis kaj ludis sian fluton por sia amato'. Tiu loko estas registrita en la Mondrekorda Libro de Guinness kiel tiu kun la plej longa loknomo en la mondo. Tamen, en Tajlando oni raportas ne-atestitan alternativan nomon por Bankoko, kun eĉ 163 literoj:

Krunghemphanakornamornratanakosinmahintarayuthayamahadilokphopnopparatrajathaniburiromudomrajaniwesmahasatharnamornphimarnavatarsathitsakkattiyavisanukamprasit.

Interkultura



Rubrikestro: Elena Nadikova,
Lernejo/Ŝkola 55
str. Leninskogo Komsomola 54,
RU-428037 Ĉeboksari, Rusio.
lena_espero@mail.ru.

Saluton, karaj amikoj!

Nia interkultura mondo, kiel ĉiu mondo, estas vasta kaj senlima. En ĝi, kiel riveroj en la oceano, renkontiĝas diversaj tradicioj, moroj, kulturoj. Vojaĝante tra ĝi, eblas ekvidi la plej variajn opiniojn, kutimojn, gustojn kaj vivmanierojn absolute nesimilajn unu al alia.

Tamen estas facile diri aŭ skribi: vojaĝante... Kaj kiel ĉirkaŭvojaĝi Interkulturan Mondon fakte? Hodiaŭ al tiu ĉi demando respondos geknaboj el la lerneja Esperanto-klubo 'Betuleto' de la urbo Ĉeboksari, Rusio. En ilia naskiĝ-urbo jam la 11an fojon okazas tre interesa kaj neordinara aranĝo – Internacia Lingva Festivalo.

Kio estas la Lingva Festivalo? Ĝi estas festo de internacia komunikado, kies partoprenantoj povas estigi vojaĝon tra la tuta mondo, konatiĝi kun la moroj kaj kulturoj de la plej diversaj landoj kaj popoloj, "malfermi" por si multan novan kaj interesan kaj trovi novajn amikojn.



La bazon de la programo de la Lingva Festivalo konsistigas prezentadoj de lingvoj – konciza rakonto pri la lingvo kaj landoj, kie oni uzas ĝin. Tre ofte lingvojn prezentas iliaj portantoj mem – la gastoj el diversaj landoj de la mondo, kiujn la organizantoj invitas al la festivalo.

Instruistoj rakontas pri la origino de la lingvo, ĝia historio kaj ĉefaj reguloj. Partoprenantoj de la prezentado havas eblon ekaŭdi, kiel sonas tiu ĉi lingvo, eklerni kelkajn frazojn en ĝi kaj konatiĝi kun moroj, tradicioj kaj arto de tiuj landoj, kie ĝi funkcias.

La celoj de la Lingva Festivalo estas:

- montri la variecon kaj unikecon de la mondaj lingvoj;
- altiri atenton al fremdaj kaj naciaj lingvoj, kiujn kutime oni ne studas enkadre de lerneja kaj altlerneja programoj, kaj ankaŭ al artefaritaj lingvoj (ekzemple, Esperanto);
- konatigi la kulturojn de diversaj mondpopoloj;
- stimuli intereson al studado de fremdaj lingvoj, kaj sekve, deziron konatiĝi kun aliaj landoj, iliaj tradicioj, vivstilo;
- entiri junularon en procezon de aktiva internacia komunikado;
- eduki junularon en spirito de toleremo kaj internaciismo.

En diversaj jaroj dum la festivaloj estis prezentitaj de 14 ĝis 40 mondlingvoj. La plej granda kvanto - 46 - estis dum la naŭa Internacia Lingva Festivalo en 2004. Inter ili troviĝis ne nur disvastigitaj lingvoj de Eŭropo, Azio kaj Ameriko (ekzemple, angla, franca, hispana, hindia, araba ktp), sed ankaŭ sufiĉe maloftaj kaj iufoje eĉ ekzotikaj (ekzemple, afrikaj lingvoj haŭsa, eondo; suahili, urdu ks)

Tamen la programo de la lingvaj festivaloj ne elĉerpiĝas nur per prezentadoj. Enkadre de la festivalo okazas konkursoj por kompetentuloj de la lingvistiko kaj poliglotoj; diversformaj kvizoj; lingvistikaj KGS-oj (konkursoj en la Klubo de gajuloj kaj sprituloj); science praktikaj konferencoj, dediĉitaj al diversaj problemoj de la



funkciado kaj interago de la mondlingvoj. Organizigaĵas tiel nomataj lingvoteritorioj – la zonoj de libera scipovo de lingvo (inter ili, unufoje ĉi-jare por la plej junaj partoprenantoj); renkontiĝoj kun interesaj homoj


Vizitu la hejmapaĝon Interkulturo! Vizitu la kvizojn, la forumon, ktp. Anoncu vian grupon. Komparu vian vivon kaj ŝatojn kun tiuj de aliaj grupoj en aliaj landoj kaj kulturoj. Malkovru la diferencojn inter vi, kaj trovu ankaŭ tion, kio estas inter vi komuna! www.interkulturo.net

kies profesia kaj socia agado estas ligita kun lingvoj; ekspozicioj de la literaturo en diversaj lingvoj.

De multaj jaroj konstantan sukceson havas internaciaj koncertoj, kie koncertas gastoj, instruistoj, organizantoj, kaj, certe, profesiaj kolektivoj.

La festivaloj altiras atenton de ŝtataj institucioj, diversaj sociaj organizoj kaj amaskomunikiloj. Dum diversaj jaroj kiel honoraj gastoj de la festivalo estis scienculoj kaj kulturaj agantoj, reprezentantoj de ambasadorejoj kaj inform-centroj, ĵurnalistoj, muzikistoj, kaj aktivuloj de la esperanto-organizoj de diversaj ŝtatoj de la mondo.

Ekde la jaro 2000 enkadre de la festivalo okazas vasta antaŭa programo. Ĝi inkluzivas vesperojn de internacia amikeco – “Karavanoj de lingvoj” – en la lernejoj de la urbo kaj respubliko (Ĉeboksari estas la ĉefurbo de la Ĉuvaŝa Respubliko en Rusio); renkontiĝojn de honoraj gastoj kun lerneja junularo, konkursojn de ekzercaj verkoj kaj desegnaĵoj. Ekzemple, ĉi-jare la temo de la desegnaĵ-konkurso iĝis herooj de mondfabeloj.



Lernejoj el diversaj urboj de la respubliko pentris siajn plej ŝatatajn fabelajn heroojn, iliajn aventurojn kaj gajajn petolaĵojn. La konkurso estis organizita por infanoj de 7 ĝis 14 jaraĝaj. En niaj paĝoj vi vidas desegnaĵojn de venkintoj – Bondarenko Nadja kaj Pantelejmonova Alina.

Ankoraŭ unu interesa aranĝo de antaŭprogramo de la Lingva Festivalo estas “Karavanoj de lingvoj”. Ĉi-jare en ĝi partoprenis la membroj de la klubo ‘Betuleto’. Jen kion ili rakontis. “En oktobro en nia lernejo okazis interesa kaj neordinara aranĝo – Lingva maratono.

La lernejon vizitis fremdaj gastoj el kelkaj landoj – Nederlando, Hispanio, Pakistano kaj Nepalo. Ili rakontis pri siaj landoj, la vivo de loĝantoj, konatigis nin kun siaj naciaj lingvoj, popola arto kaj kulturo. Rusiaj

geknaboj aŭdis kantojn kaj poeziaĵojn en nekonataj lingvoj, kun intereso ili fiksaŭskultis al konataj vortoj, kiuj tiel nekutime sonas en fremda lingvo; lernis saluti unu la alian en la hispana, nepala, nederlanda kaj urdua lingvoj, kaj, certe, en Esperanto. Geknaboj el mezaj klasoj povis kontroli la ricevitaĵojn dum la Konkurso de poliglotoj, kiun organizis por ili membroj de la Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko. La pliaĝaj lernejoj dum tiu tempo diskutis kun la eksterlandaj gastoj iujn problemojn komunajn por la tuta homaro.



Finis la maratonon interkultura koncerto. Sur la sceno koncertis kaj lernejoj kaj gastoj, do oni spektis programerojn en la plej diversaj lingvoj: rusa kaj ĉuvaŝa, angla kaj hispana, nepala kaj germana. Kaj, certe, Esperanto. La aranĝo estis kolorriĉa, neforgesebla spektaklo, vera festo de lingvoj kaj kulturoj, amikeco kaj interkomunikado, kiu unuigis homojn de

diversaj nacioj. Du lokaj televidaj kanaloj montris raportaĵojn pri tiu aranĝo”.

Kaj ĉio tio iĝis ebla danke al Esperanto – mirinda lingvo, kiu amikigas homojn sendepende de ilia haŭtkoloro, religio, ŝtata kaj nacia aparteno. Esperanto estas la lingvo de amikeco kaj reciproka kompreniĝado, la lingvo, kiu donacas al homoj eblon komuniki unu kun la alia kaj trovi konstante novajn amikojn el la plej diversaj anguloj de nia planedo.



**Unuvorte, Esperanto estas
vera
Interkultura
Lingvo!**

(Vortklarigoj: vidu paĝon 33)

Simbolaj solvoj

Jen la truo, sed kiu formo eniru ĝin? Sandra jam skribis per kreto literojn A, B kaj C apud la kandidatoj.

“Certe ne A, ĉar tiu kvadrato estas meze de la triangulo.”

“Kaj la eta cirklo estas interne de la granda cirklo. Klare, tio malĝustas.”

“Do, A ne estas la solvo,” diras Karlo: “Kion pri B?”

“La eta cirklo kuŝas maldekstre. En la modelaj formoj, la eta cirklo estas supre aŭ sube.”

“Prave. Kaj ĉe C la eta cirklo kuŝas sube. Eble tiu estas ĝusta.”

“Jes, rigardu, en la unua ĝi estas supre, dua sube, tria supre... do logike: la kvara estu sube.”

“Ankaŭ la kvadrato estas en ordo. En la unua ĝi estas en la blanka parto de la triangulo, en la dua ĝi estas ekster ĝi, en la tria ĝi estas interne denove...”

“Kaj sama logiko kiel ĉe la cirklo – logike, la kvara kvadrato estu ekster la triangulo.”

“Sed la triangulo estas pli malfacila. Ĉu C estas ĝusta por la triangulo?”

“Kio estas la diferenco inter la unua triangulo kaj la dua?”

“Ĝi turniĝis dekstren je 90 gradoj.” diras Sandra.

“Kaj inter la dua kaj la tria?”

“Ĝi turniĝis dekstren je 180 gradoj – do ĝi aspektas spegule.”

“Hmm.” pensas Sandra: “90 – 180, logike la sekva estos 270.”


“Kaj vere! Rigardu, la triangulo C estas turnita je 270 gradoj!”

Ili skrapas la teron por liberigi la brikon kun formo C kaj metas ĝin en la truon. Sablo tuj ŝutas sin en la ĉambron.

“Ho, ne, ankoraŭ unu kaptilo! Ĉi tio devis doni trezoron, ne sablon.”

“Sed rigardu la koloron de la sablo!” krias Roberto: “Ora!”

Febre ili prenas la sablon inter siaj manoj kaj verŝas ĝin en la kunportitajn sakojn.



"Rapide, uzu vian ŝovelilon! Donu al mi la plenan sakon, mi forportos ĝin." Tiel ili laboradas, por ne malaperi sub la sablon.

Horon poste la esplorista grupo elvenas al la lumo – ĉiu portas pezan sakon.

La piramido fordonis sian sekreton!

Hajnal MacGill

SOLVOJ el 2006/2

Respondo por la Spacvort-enigmo (p. 30) → kaj la Best-enigmato (p. 21) ↓

K	A	T	O	N
U	/	E	N	E
N	E	S	T	O
I	/	T	/	N
K	L	U	B	O
L	U	D	O	N
O	N	O	N	/

					N												
					N	E	A	J									
					N	E	P	T	U	N	O						
					E	Ŭ	R	O	P	O							
					S	A	T	E	L	I	T	O	N				
					A	/	R	/	T	/	B	O					
					T	E	/	R	E	A	L	A					
					U	N	I	V	E	R	S	O					
					U	R	A	N	O	N	/	T	/	R			
					N	/	T	S	/	O	R	B	I	T			
					K	O	M	E	T	O	/	O	/	N	I		
					S	E	/	A	/	O	/	V	/	A	G	O	
					T	/	P	R	I	N	T	E	M	P	O		
					V	E	N	U	S	O	/	E	R	/	U	J	O
					P	L	U	T	O		G	R	A	N	D		K

Respondo por Besto-parado (p. 34):





Ĉevalo, Urso, Najtingalo, Insekto, Aglo, Krokodilo, Leono, Antilopo, Struto, Orangutano, Hipopotamo, Anakondo, Vulturo, Omaro, Simio, Talpo, Erinaco, Mamuto, Pando, Ovo, Noktuo, Vulpo, Iguano, Zebro, Indiano, Testudo, Ido, Leporo, Aligatorio, Baleno, Elefanto, Serpento, Tigro, Ornitorinko, Ĝirafo, Apterigo, Rinocero, Delfeno, Emuo, Nesto, Okulo, Nizo. La kaŝfrazo: ĈU NIA KLASO HAVOS TEMPON VIZITI LA BESTOGĀRDENON?

Vortklarigoj por 'Interkultura mondo', p. 28-31

moroj: kredoj kaj sekve manieroj konduki
origino: deveno, komenc-punkto
stimuli: estigi, sproni
tradicia: kiel en antaŭa tempo
varia: diferenca, malsama unu al alia
ekzotika: malkutima, fora, interesa

poligloto: homo kiu parolas multajn lingvojn
kolektivo: grupo, teamo
ambasadoro: homo kiu reprezentas landon
betulo: speco de arbo
karavano: parado, ekspedicia grupo
maratono: longa kur-konkurso

Abunda besto-fest'






Horizontale →

- La bestoj kiuj sekvis flutiston en Hamelin (B1)
- Speco de rano (B3)
- Ĉevalo estas ____ kaj fidela besto.
- Jen ok pomoj por kvar ĉevaloj, donu al ili ____ du.
- La cerbo troviĝas en la ____o de besto aŭ homo.
- Sovaĝa besto parenca al hundo. (B10)
- Ursoj dormas ____ la vintro.
- "____ ŝatas bestojn!" diras la knabino.
- Granda nigra birdo. (R) (B14)
- Kuniklo manĝas kvar karotojn, kobajo manĝas du. Ĝi manĝas la du ____an kvanton.
- "Mi amas mian ____" (B17)
- Dufoje kvincent
- Agloj ____as super la kanjono. (Supren-flugas).
- Prefikso kun signifas 'iama' sed ne 'nuna'.
- Bela dombesto – ŝatas lakton, ronronas. (B24)
- Plenkreska (R)
- "Ni iras ____ la besto-ĝardeno."

27. Varmiga vesto (R)
29. Tradicia japana dramo.
30. Tropikaj fruktoj kiuj nomas koloron.
31. Nov-Jorko (mallongigo)

Vertikale ↓

1. Prefikso kiu signifas 'denove'
2. Urba surrela transportilo (R) – en malnovaj tempoj tio estis ĉevalo tirata.
3. Granda farm-besto kiu donas al ni lakton. (B3↓)
4. Iuj kameloj havas nur ____ ĝibon, aliaj havas du.
5. Ĉasbirdo – plonĝante atingas 300 km/hore. (B5↓)
6. Tiu havas ok piedojn, ____ ĝi devas esti araneo.
8. La pomoj estas ____ la ĉevaloj.
9. Besto kun longaj oreloj kiu saltas kaj ŝatas karotojn (B9↓)
11. Malgrandan ĉevalon. (B11↓)
12. Loĝejo. (R)
13. Malgrandajn grizajn bestojn (R) (B13↓)
15. Malantaŭaj pendaĵoj ĉe multaj bestoj – ĉe manksaj katoj ĝi mankas!
18. Mitologia fajro-sputa bestego (B18↓)
20. Leono estas ____ reĝo de la bestoj.
23. Identita kopio (R) (B23↓)
28. La tempo tra kiu oni jam vivis. (R)



R = uzu nur la radikon
B = vidu la bildon kun la donita numero

Se vi elektis respondon B por 'La piramidoj', vi malpravas. Jen vi inter sovaĝaj bestoj. Reiru kaj provu denove; elektu pli saĝan respondon.





Sinjoro eniras restoracion. La kelnero tuj alvenas:

"Bonan tagon, sinjoro. Kion vi deziras?"

"Mi ŝatus manĝi tion, kion tiu viro estas manĝanta."

"Konsentite, sed ne estos facile preni de li la teleron."

Sinjoro sidas ĉe okul-kuracisto antaŭ tabulo kun surskribo

WZKIMTCUH.

"Do, ĉu vi povas legi tion?" demandas la kuracisto.

"Kompreneble. Sed ĉu vi ne havas ion en nia gepatra lingvo?"



humuro 

de Dieter Bernd, Germanio
kaj Saliko, Finnlando


Gepatroj en kamparo havis filon, kiu ne ekparolis antaŭ la aĝo de naŭ jaroj. Tiam li estis staranta ĉe la kampo-rando kaj rigardis sian patron, kiu laboris. Subite la filo rimarkis virbovon minace ekkuri al la patro.

- Ho, paĉjo, atentu! Virbovo!

Tio savis la patron, kiu poste demandis:

- Pro kio vi nur ĵus ekparolis la unuan fojon en via vivo?

- Antaŭe mi havis nenion por diri.



Geza KURUCZ
Emerita lingvo-instruisto,
kunredaktoro de Juna Amiko,
honora membro de ILEI




ESPERANTO KAJ MI

Precize antaŭ 50 jaroj, nur kelkajn semajnojn antaŭ la fama oktobra revolucio de la hungaroj en 1956 mi konatiĝis kun Esperanto. Tiu-tempe mi laboris en Budapeŝta teatro „Madách” (:Madaĉ) kiel kulisisto. En liberaj antaŭtagmezaj horoj mi ofte vizitis la ĉefbibliotekon, kaj en iu somerfina tago pruntis, kvazaŭ hazarde, Esperanto-lernolibron. Legante ĝin mi estis pli kaj pli ravita pro la simpleco kaj logikeco de la lingvo kaj – malgraŭ tio, ke mi ĝis tiam interesiĝis nur pri natursciencoj kaj havis nur malsukcesojn en lingvolernado – decidis lerni la lingvon, sciante nenion pri tio, ĉu ekzistas ankoraŭ esperantistoj (la libro, kiun mi pruneprenis, aperis fine de la 19a jarcento). Dank’ al Esperanto, kiun mi alproprigis sufiĉe bone en duonjaro, mi fariĝis poste lingvo-instruisto kaj ĝuanto de lingvistiko.

Tamen, pli ol la struktura klareco kaptis mian koron la demokratiismo, kiu estas nedisigebla esenca parto de la lingvo. Esperanto estas por mi multe pli ol unu el la ekzistantaj lingvoj. Antaŭ ĉio ĝi estas ideo nobla, kiu dum marĉoplena jarcento ne malpuriĝis, kompromitiĝis. Tiu ĉi pont-lingvo interligas ne lingvajn surd-mutulojn, sed antaŭ ĉio kaj ĉefe homajn korojn. Miaopinie vera esperantisto distingiĝas ne nur per parolkapablo de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ per malfermiteco al homaj suferoj kaj maljustaĵoj. Sindona adepto de la neŭtrala komunikilo deziras aktive – ne per buŝo, sed per agoj – fari ion utilan por siaj hom-fratoj. Mi esperas, ke multaj el vi ĝuste pro tio laboras por Esperanto.

Mi fidas la sobrecon de la homaro kaj kredas, ke post longa, persista agado estos atingebla ankaŭ nia celo. Ne forgesu la historian sperton: cel-konsciaj idealistoj povas kaj devas antaŭenpuŝi la homaron.



JAPANIO

Demandoj kaj respondoj pri Japanio.

- ***Ĉu Japanio estas parto de Ĉinio?***
- Ne. Japanio etendiĝas en kurbo laŭ la orienta bordo de la Azia Kontinento en la Pacifika Oceano. Konsistanta el 6000 insuloj laŭ sia areo ĝi estas tiel granda kiel Germanio.
- ***Ĉu Japanio estas tropika lando?***
- Ne aŭ jes. Ĝi estas tiel longa de la sudo ĝis la nordo, ke en la plej norda insulo *Hokkaido* multe neĝas, sed en la plej suda insularo *Okinaŭa* tröprike sunas.
- ***Kiom da sezonoj estas en Japanio?***
- Kvar sezonoj. La plej belaj sezonoj estas printempo kaj aŭtuno. En printempo floras sakura-floroj ĉie kaj multaj homoj turismas, sekvante la flordon. En aŭtuno ĉie estas aŭtunaj koloroj.
- ***Ĉu Japanio estas ebena lando?***
- Ne, Japanio estas montara lando. 67 procentojn de la lando okupas montaroj, kaj la plej alta monto estas la monto *Fuĵi* kun alteco de 3776 metroj. Ĝi ne estas tiel alta kiel montoj en Nepalo, sed ĝia formo estas tre bela.
- ***Kiom da homoj vivas en Japanio?***

Jokohamo, la kongres-urbo



- 126 milionoj da homoj. Laŭ la loĝantaro Japanio okupas la 9an lokon en la mondo. Tamen naskiĝoj malpliĝas, sekve Japanio ekŝrumpas en la venontaj jaroj. Pli ol 20% de la loĝantaro konsistas el maljunuloj (pli ol 64-jaraĝaj) kaj malpli ol 15 % el junuloj (malpli ol 15-jaraĝaj). La plej granda urbo estas Tokio kun preskaŭ 8.2 milionoj da loĝantoj, kiun sekvas Jokohamo kun 2.8 milionoj da loĝantoj, kie okazos la venonta 92a Universala Kongreso (UK) de esperantistoj.
- ***Ĉu japanoj surportas kimonon ĉiutage? Ĉu ekzistas samurajoj kaj ninĵaoj (spiono en la feŭdisma epoko) en Japanio?***
- Vi vidis tro da japanaj filmoj pri malnova Japanio. Nun jam ne vivas samurajoj kaj ninĵaoj. Ĉiuj surportas eŭrop-stilajn vestaĵojn escepte de specialaj okazoj kiel Nov-jaro kaj ge-

edziĝaj festoj.

– **Kia estas Tokio, la ĉefurbo?**

– En Tokio konkure skrapas la ĉielon altaj, modernaj konstruaĵoj kaj oni laboras per komputiloj. Rapidegaj trajnoj kuras al diversaj direktoj de Tokio.

– **Kiuj estas la plej respektataj artistoj de la lando?**

– Estas ege malfacile respondi tiun demandon. Japanoj havas diversajn ŝat-okupojn kaj pens-manierojn, do laŭ homoj diferencas la respondoj. Ne ekzistas eminentaj homoj, kiuj simbolas Japanion.

– **Kia estas la vivo de japanoj?**

– Same kiel en la filmoj, japanoj vivas tradicie hejme, manĝante rizon kaj fiŝajon per manĝo-bastonetoj kaj loĝante en ĉambroj kun tatamoj*.

– **Ĉu Toyota vere estas japana aŭtomobilo?**



Sintoisma templo en Nov-jaro kun bambua ornamaĵo „kadomacu”

– Jes. Japanio estas industria lando, kiu produktas multajn modernaĵojn. Ĉu vi konas jenajn nomojn: Toyota, Nissan, Honda, Suzuki, Yamaha, Sony, Nikon? Ili ĉiuj estas nomoj de japanaj kompanioj. Ĉirkaŭrigardu kaj vi certe povos trovi japanajojn ankaŭ ĉe vi.

– **Kiaj estas la japanaj geknaboj?**

– Ili devige vizitas bazlernejon 6 jarojn kaj mezlernejon 3 jarojn. Poste la plej-parto vizitas pli altan lernejon kaj post ĝi la duono da ili eniras universitaton. Tamen ili ne tre ŝatas lerni. Ili preferas komikaĵojn, komputilajn ludojn, basbalon kaj piedpilkon.

– **Kia estas la politika situacio de Japanio?**

– La plej grava problemo estas, ke la registaro estas kvazaŭ subulo de Usono. Ĝi ĉiam sekvas la vojon pavimitan de Usono. Ĝi sendis japanojn al Irako por subteni la usonan okupadon. Japanio akceptas multajn usonajn milit-bazojn. Nun ĝi intencas abolicii la nunan konstitucion, kiu malpermesas al Japanio milit-raĵton kaj posedon de militforto. Tiu ĉi konstitucio naskiĝis el la cindro de la dua mond-milito, kiun kaŭzis Japanio en tuta Azio. Ĝi garantias al la aziaj popoloj, ke Japanio neniam milit-atakos ilin. Japanaj pac-amantoj nun aktive batalas kontraŭ la ŝovinisma deziro de la registaro.

– **La venont-jara 92a UK okazos en Japanio. En kiu urbo?**

– Ĝi okazos en haven-urbo Jokohamo, najbara urbo de Tokio, kun 2.8 milionoj da loĝantoj, de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto. Venu al Japanio

kaj vidu ĝin per propraj okuloj. Ni elkore bonvenigos vin.

- *Fine, rakontu mallonge pri la japana Esperanto-movado.*
- Esperanto venis en Japanion en 1896 kaj la movado komenciĝis en 1906, do, en la nuna jaro ni havas la 100-jaran jubileon de nia E-movado. Nia movado apartenas al la plej malnovaj E-movadoj en la mondo. La ĉi-jara Japana Kongreso estis la 93a kaj nia organo *La Revuo Orienta* numeriĝis je 1024 ĉi-aŭguste. Tut-lande troviĝas pli ol 100 E-klubo. Dank' al la ekonomia forto de Japanio ĉiun jaron preskaŭ 200 esperantistoj partoprenas en ĉiu UKo kaj subtenas la sukceson finance. Tamen konforme al la maljuniĝanta Japanio, ankaŭ la japana esperantistaro maljuniĝas. Tio estas la plej granda problemo.

Intervjuito: *Jasuo HORI, Japanio*

- * tatamo: japana mato fortikige subtegita per dika tavolo da pajlo por kovri la plankon de la ĉambroj. (PIV)

abolicii: oficiale nuligi / *areo:* horizontala amplekso de loko, kampo, lando / *basbalo:* speco de grupa sport-ludo / *cindro:* restaĵo post brulligno / *financi:* doni monon por ebligi plu-ekziston, evoluon / *garantii:* neretireble promesi / *kimono:* karakteriza japana vesto / *komika:* ridige humura / *kompanio:* grupo de personoj, kiuj kune direktas entreprenon / *konforme:* sekve de, konsidere al / *konkuri:* deziri superi aliajn / *konstitucio:* baza leĝaro de ŝtato / *moderna:* nun-tempa, laŭmoda / *pompi:* belege superregi / *simbolo:* esti kvazaŭ reprezentanto de io / *spiono:* kaŝ-observanto / *ŝovinismo:* blinda nacia mem-amo / *ŝrumpi:* nerapide malgrandiĝi / *tradicio:* kutimo, ricevita de antaŭuloj / *trajno:* vagonaro / *tropika:* Afrike varmega / *universala:* tut-monda, por ĉiuj valida.

Frandaĵoj esprimoj kun OKULO

nenies okuloj restis sekaj

(ĉiuj estis kor-tuŝitaj)

pli da okul-paroj, malpli da eraroj

(komuna decido plej ofte estas fidinda)

unu okulo ridas, la alia ploras

(samtempe ĝoji kaj malĝoji pro io)

rigardi al iu en la okulojn

(ne timi diri al iu la veron)

kie vi lasis viajn okulojn?

(ne rimarki evidentan intencon)

ne kredu al orelo, kredu al okulo

(kredu ne al oni-diro, sed al faro videbla)

rigardu per ambaŭ okuloj

(estu tre atentema)

fari grandajn okulojn

(subite ekmiri)

malfermi la okulojn de iu

(montri al iu la veran celon de iu)

ravi iun per okuloj

(kapti iun per sia beleco, afableco)

la okulojn evitas la dormo

(ne povi dormi)

videbla per nudaj okuloj

(esti videbla sen okulvitroj, lupeo)

fari ion antaŭ la okuloj de iu

(fari ion en la ĉeesto de iu)

okulon pro okulo, denton pro

dento

(sammaniere repagi al ies malbonfaro)

preskaŭ trapiki iun per okuloj

(kolerege rigardi al iu)

ne kredi al siaj okuloj

(multe dubi pri io)

riski unu okulon

(tre kuraĝe decidi pri io)

nenies okuloj restis sekaj

(ĉiuj estis kor-tuŝitaj)

eltiri larmojn el la okuloj

(io kor-tuŝas iun)

ILUSTRITA FRAZELOGIO


„Ilustrita frazeologio”, libro de *Sabine Fieder* kaj *Pavel Rak* enhavas multajn tre utilajn parol-turnojn. Mendebla ĉe eldonejo KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prago), Ĉeĥio.
(Rete: info@kava-pech.cz , TTT-ejo: www.kava-pech.cz).

Ĉi-foje ni prezentas al vi frazeologiaĵon:

Malfermi la okulojn al iu

Klarigo:

Forigi iluziojn kaj montri al iu la efektivan realaĵon; igi iun ekkoni la veron; komprenigi al iu ion antaŭe ne viditan aŭ komprenitan.



Ekzemploj:

- Vi mem ĵus diris: ili kredas sin kapitalistoj. Sed vere ili estas la viktimoj de la sistemo. Ili vivas de iluzio. Tial ni devas *malfermi al ili la okulojn*. (S. Elgo LA FLOROJ DE L' KREPUSKO, 1995, p. 87)
- Ŝi sciis nenion pri la am-rilato de sia edzo al la plej juna kaj eleganta aktorino de la loka teatro ĝis mi *malfermis al ŝi la okulojn*. Tamen, de tiu tempo mi havas konstantan konscienc-riproĉon.
- La instruistino de biologio provis *malfermi la okulojn al siaj gelernantoj*, ke per forĵetado de diversaj produktoj (aĉet-saketoj, boteloj, tasoj kaj aliaj) el plasto ili malpurigas ne nur sian lernejon kaj urbon, sed ankaŭ la tutan naturon, kaj tio jam nun rezultigas perturbojn: inundojn, cunamojn k.a.
- Mi ne povis *malfermi al li la okulojn*, li obstine sekvas siajn kutimojn kaj ne rimarkas, kiom li malutilas al si mem per siaj misfaroj.


frazeologio: esprimo propra al iu lingvo / *iluzio*: tro pozitiva opinio pri io / *krepusko*: duon-lumo / *perturbo*: renversigo de kutimaj aferoj / *viktimo*: homo, kiu fariĝis venkito .

Bildoj el la historio de ESPERANTO

III. Estiĝo de la movado por Internacia Lingvo

En la jaro 1879 en la urbeto Litzelstetten (ŝtato Baden, Germanio) aperis lingvo-projekto, kiu altiris la atenton de la gazetaro. Ĝia aŭtoro estis la katolika pastro *Johan Martin Schleyer* (Ŝlejer), kiu nomis sian plan-lingvon VOLAPÜK (Esperante *volapuko*). En la sekva jar-deko plurmil adeptoj klopodis lingvigi ĝin. Dum tiu jardeko oni eldonis Volapuk-lernolibrojn en 25 lingvoj. En 1888 la volapukistoj havis 14 periodaĵojn kaj 200 lokajn societojn en pluraj landoj.

Tiutempe ekestis novaj teknikaj rimedoj kaj internaciaj organizoj, kiuj ebligis internacian komunikiĝon eĉ por ordinaraj homoj. Inter ili elstaris Universala Poŝta Unio, kiu ekde 1875 establis la mond-skalan poŝtan reton, tra kiu amasiĝis la internacia leter-trafiko. Tio ebligis estiĝon de nov-tipaj internaciaj movadoj kaj organizoj. Tia estis la Volapuk-movado, kiu konsistis el individuoj, vivantaj diaspore en la mondo. Ĝia devizo estis: *“Unu lingvon por unu homaro, ne damaĝante la gepatran lingvon.”*



La unua kongreso de la volapukistoj okazis en 1884 en la urbo Friedrichshafen (Baden), la dua en 1887 en Munkeno (Bavario), sed la uzata lingvo de ambaŭ kunvenoj estis la germana. Nur la tria (kaj lasta) volapukista kongreso en 1889 en Parizo klopodis apliki Volapukon. Malgraŭ tiuj atingoj de la Volapuk-

movado ĝia jardeko tamen finiĝis per fiasko. La lingvo montriĝis malfacile lernebla kaj aplikebla en la praktiko. Disputoj pri la lingvo rezultigis rapidan disfalon kaj malaperon de la movado.

Relativa sukceso kaj falo de Volapuko por multaj tamen pruvis, ke tia projekto estas kreebla kaj akirinte socian bazon ĝi povas lingviĝi. Tiu ebleco movis la fantazion de pluraj iniciatemuloj. Dum tiu lingvo-planada eŭforio, ĉiu lingvoprojekto havis la saman ŝancon akiri internacian socian bazon. En tiu libera konkurado la lingvoprojekto Esperanto, kiu startis en 1887, superis la aliajn kaj definitive venkis en 1905. Ĝia iniciatinto kaj lingviĝo meritas, do, apartan atenton.

Ĉu vi scias...



1. Kiam la unua foto en la mondo estis farita?
2. Kiom da inventaĵoj havis Thomas Edison?
3. Kie estis inventita la seismografo, t.e. aparato, kiu registras indikojn de ter-tremo?
4. De kiuj ni ricevis la nun uzatajn ciferojn?
5. La unuan radon oni uzis ne por ĉaro. Por kio ĝi, do, servis?
6. Dank' al kies propono ekestis la signo @ de la elektronika poŝto?
7. Kie estis farita la unua vazo el porcelano?
8. La okulvitroj estas inventaĵo de italo, Alessandro Spina. De kiom da jaroj ni uzas ilin?
9. Kiam oni fabrikis la unuan biciklon?
10. Kie estis konstruita la unua metroo?
11. En kiu Afrika ŝtato vivas plej multe da homoj?
12. Laŭ juda religio kiu tago de la semajno estas festo- kaj ripoztago?

Zoltan KURUCZ, Hungario

Solvoj ĉi-sube.

1. En 1826. Tiam Joseph Niepce, franco fotis vidaĵon el la fenestro de sia labor-ĉambro.
2. Li akiris patenton pri ĉ. 1000 inventaĵoj, inter ili pri la elektra lampo kaj fonografo.
3. En Ĉinio, ĉirkaŭ 132 jarojn a.k.
4. De la araboj.
5. Kiel disko de porfaranĝo en Mezopotamio ĉ. 3500 jarojn a.k.
6. Proponis ĝin Ray Tomlinson, la inventisto de ret-poŝto.
7. En Ĉinio, kie oni uzis porcelanon ĉ. 850 jarojn p.k. Eŭropo ekuzis porcelanon nur 350 jarojn poste.
8. De ĉirkaŭ 700 jaroj.
9. En 1839. La inventaĵon de la anglo Macmillan oni nomis velocipedo.
10. En la ĉefurbo de Hungario en la jaro 1896.
11. En Nigero, 80 milionoj.
12. Sabato.

En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literaturo heredaĵo dank' al la plumo de nia fidela amiko, elstara islanda poeto, Baldur RAGNARSSON. Konsciu, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel-konscia esperantisto, sukcesa pledanto por nia nobla ideo. (Red.)

26 Hilda DRESEN, estona poetino

*Kion diri, kiel miri!
Ĉe vojjfino sur ruino
forlasite, homevite
en rubaĵo kreskis flor'.*

*La burĝonoj inter ŝtonoj,
jam kun revo pri
diskrevo
ĝojsalutas, ja surŝutas
ilin sun' per sia or'.*

*En rubaĵo kun kuraĝo
floro floras, vivon gloros,
bluos, bluos kaj instruos
ion al la homa kor'.*

Per tiu ĉi poemo finas sian solan originalan poemplibron la estona poetino *Hilda Dresen*. La libro nomiĝas *Norda naturo* (1967) kaj la titolo de la poemo ne estas io aparta, sed simple ripeto de la unua linio. Kaj ja indas tia ripeto! Ĉar temas pri io, kion ni homoj kutime ne rimarkas, kaj des malpli taksas valore signifa. Estas floreto levanta sian blupon sur rubaĵo ĉe iu vojofino. Sed la poetino ĝin ja rimarkas, kaj laŭ sia poeteca naturo ŝi scias kombini observon kaj sentemon en transiran sperton. Kaj kia estas tia transira sperto? Ĝi estas agnosko de vivo

ŝajne sensignifa kaj nerimarkinda, ke ankaŭ tia vivo havas valoron, kaj kiel tiu valoro povas instrui al la homa ko-

BILDOJ EL LA HISTORIO

ro respekton al ĉia vivo.

Hilda Dresen (1896-1981) naskiĝis en Harju-distrikto en Norda Estonio, en arbaro-riĉa regiono, kie ŝia patro laboris kiel forstisto. Sendube devenas ŝia sindoneco al la naturo de ŝia elkresko inter la arboj kaj la floroj de ŝia hejmloko. Oni ankaŭ trasentas la influon de la sezonoj sur ŝian menson, precipe aŭtuno kaj vintro: la norda vento el trans la Finna Golfo sentigas sin dum sia senripoza galopado tra la ebenaĵo, ĝi trapenetras la timeman homon sur la vojo, kaj la kaŭrantaj inertuloj, serĉantaj ŝirmon, nur incitas la venton kaj plifirmigas ĝian senindulgemon. Sed la poetino rekonas ian spiritan naturon de la vento:

*La venton nur kuraĝ' imponas,
nur hom' de l' sankta malkviet',
al li ĝi frate manon donas,
ke li kunkuru kun impet'.*

*Ĝi volas, ke dum kur' ekardu
kaj palon perdu lia vang',
ĝi volas, ke la hom' sin hardu
kaj ŝtorme fluu lia sang'.*

(Vento)

escepte sugestas aŭ indikas ekster si mem al subtila anim-stato de melankolio aŭ sopiro. Tamen neniam sintrude, Hilda scias precize ekvilibrigi siajn esprimojn. Sed ŝia humoro povas ankaŭ ribeli kontraŭ la danĝeroj de deprimado, eĉ per senkompataj, insultaj vortoj kontraŭ ŝi mem. La poemo *Malbenita humoro* komenciĝas en printempa suno, kiu "la tutan mondon oras", tamen ŝian koron "morno

LITERATURO DE LA ESPERANTA

Indas iom pripensi la nocion: "sankta malkvieto". Kion per tio celas la poetino? Malkvieton oni ĝenerale konsideras ne bona afero, fakte malbona anim-stato por tiel diri, ĝi parenecas al zorgoj pro okazaj malbonoj kaj timo. Sed la akompana epiteto "sankta" nobligas la nocion, faras la maltrankvilon nutranto de kuraĝo kaj vivplena ardo.

Sed malgraŭ tia firma preno de kuraĝo Hilda Dresen pli tendencas al kvieto kaj melankolio en siaj natur-temaj poemoj:

*La silento muta
en la ĉambrom fluas,
dum sopir' akuta
la animon skuas*

ŝi diras en sia poemo *Somernokto*. Fakte, ŝiaj natur-poemoj preskaŭ sen-

boras": ŝi antaŭsentas deprimon, kio ĝenas ŝin, timigas ŝin, sufokas ŝin,

*Kaj por elŝiri min el ĉi sufoko
mi min insultas kun incita moko:
Diable! Vi bezonus bonan frapon
aŭ freŝan akvon sur la pendan kapon.*

Sian libron la poetino dividis en kvin partojn, kiujn ŝi nomis per titoloj pli-malpli temajn: *Sezonoj, Floroj, Tenero, Humoroj kaj Pensondoj*. La du unuajn oni povas rigardi kiel plej esencajn al la koro de la poetino, ŝi estas antaŭ ĉio amanto de la naturo kaj el ŝiaj memoroj kaj spertoj pri la naturo ŝi plej facile prenas temojn, kiujn ŝi scias profundigi per ligoj al homaj cirkonstancoj kaj kondiĉoj. Simple kortuŝa estas ekzemple ŝia poemo *Marto milittempa*:

*Kia sensuna marto!
 Neĝas, neĝas sen halto.
 Per kvieto sensona
 kaj falad' monotona
 volas la neĝo luli,
 trankviligi la korojn,
 el la anim' forruli
 la ĉagrenajn memorojn,
 volas, ke ree pure,
 pure kaj senmakule
 brilu neĝo per blanko
 sur verŝita homsango.*

Kiel tradukisto Hilda Dresen estis multe pli produktiva ol originala poeto, kaj laŭdire ŝi rigardis sin pli tradukinto ol originala poeto. El kvanta vidpunkto oni ja povas agnoski ŝian pravon pri tio. Ŝia unua traduko estis *Elektitaj versaĵoj* (1929) de Marie Under (1883-1980), unu el la plej grandaj poetoj de Estonio en la lasta jarcento. Sekvis diversaj tradukoj de poezio, i.a. kunlaborado ĉe la *Estona antologio* (1932). Elstaras ŝia traduko de fragmentoj el *Kalevipoeg*, la popola eposo de Estonio (1975).

Hilda Dresen studis en knabina mezernejo en Tallinn kaj laboris ĉe la estona poŝto ekde 1916 ĝis sia emeritiĝo en 1956, komence kiel telegrafistino kaj poste kiel radio-telegrafistino. Ŝi esperantistiĝis

en 1913, tiam 17-jara kaj komencis labori poezie en Esperanto en 1922. Ŝiaj poemoj kaj tradukoj aperis en diversaj Esperanto-revuoj, i.a. *Literatura Mondo*. Pluraj originalaj poemoj ŝiaj aperis en la poemaro *Dudek Poetoj* (1934), sed plena eldono devis atendi ĝis 1967, kiam la eldonejo Stafeto ĝin aperigis en sia serio de Beletraj kajeroj.

En antaŭparola artikolo L. Tárkony esprimis la opinion, ke kelkaj poemoj de Hilda Dresen, precipe pri floroj, certe ĉarmos infanojn, kio estas ege bezonata en "nia Movadeto" kiel li diras. Tial, por fini, eble taŭgas aperigi unu el ŝiaj floraj poemoj:

*Floras la eriko, floras la eriko!
 Bonodoro rava kaj abela zum'.
 En kviet' mirinda sole ĉi muziko
 kaj kareso milda de l' aŭtuna sun'.*

*Sidu nun aŭ kuŝu, kaj vi kvazaŭ dronas
 en la lilaj ondoj de l' eriko-mar'.
 Tuta erikejo nun por vi aromas,
 dum vi tiel kuŝas meze de l' florar'.*

*Sed memor' min kaptas kaj kun ĝi
 doloro
 ŝiriĝanta kiel vea kri' el mi:
 Ho, se povus iu, kiun baras foro,
 sur la erikejo kuŝi kiel mi.*

(Eriko)

KONTAKTO

Du-monata bel-aspekta revuo de TEJO (Tut-monda Esperantista Junulara Organizo) kun interesaj artikoloj, pluraj el ili en facila lingvaĵo. Ni rekomendas ĝin al vi !

TTT-ejo: www.tejo.org/eldonoj.jsp

LINGVA DOKTORO

H

Pri vortoj kunmetitaj

En ĉiu lingvo la kunmetado de vortoj okupas gravan lokon, ĉar per ĝi oni ŝparas milojn da novaj radikoj. Por Esperanto ĝi estas aparte grava, ja nia lingvo celas facilecon kaj per klara uzado de afiksoj (= prefiksoj + sufiksoj) ni kreas minimume tri-kvaronojn de nia vorttrezoro, t.e. per kunmetado de vortoj (ekz.: *bo-patro* – patro laŭ edz(in)iĝo, *loĝ-ejo* – ejo / loko por loĝado, *ekster-land-ano* – persono, kiu estas civitano de iu lando ekster la limoj de la lando de la parolanto.)

Ĉi-foje mi volas paroli pri la ceteraj, alie, „veraj“ kunmetaĵoj. Konsciu pri tio, ke iuj lingvoj preferas analizajn formojn kiel *monda paco*, aliaj – kun-metadon: *mond-paco*. Kiun formon preferi en Esperanto? Kun la tempo en nia lingvo kreskas la nombro de la kunmetaĵoj, ĉar tiel oni povas sin esprimi pli mallonge, kaj tio aparte gravas ĉe oftaj vortoj: tiel ekestis simplaj, vaste uzataj adverboj kiel, ekzemple, el „en la lasta momento“ > *last-momente*, el „per la tuta koro“ > *tut-kore*, el „dum longa tempo“ > *long(temp)e*, sed ankaŭ substantivo kiel *vin-glaso* ekz. estas du silabojn malpli longa ol *glaso por vino*. Malgraŭ tio, evitu tro longajn kunmetaĵojn, konsciu pri tio, ke ne ĉiuj povas ilin tuj kompreni:



parlament-koridor-muro, *vek-horloĝ-montriloj* ekzemple estas iom pezaj, evitindaj. Sed tio dependas de la ĝenerala uzado. La vorto *sek-vin-bero* al neniu ŝajnas peza kunmetaĵo. Simile: *vin-ber-ĝardeno*, *tag-nokt-egaleco*.

En Esperantujo oni jam delonge diskutas pri tio, kiuj formoj estas ĝustaj: ĉu *vendotablo* aŭ *vendtablo*, ĉu *mangoĉambro* aŭ *manĝĉambro*, *pacobatalo* aŭ *pacbatalo*, ktp.

La respondo dependas de la kunmetaĵo. Kiam ekestas simple kaj klare prononcblaj son-kombinoj kiel ĉe *pacbatalo* ekzemple, oni ne aldonu finaĵon. Sed kiam estiĝas malfacilaj sonkombinaĵoj kiel ĉe *vendtablo* (*venttablo*), *manĝĉambro* (*manĉĉambro*) pro klareco oni rekomendas konservi

la finaĵon. Kelkaj vortradikoj fariĝis kvazaŭ-prefiksoj, pensu ekz. pri *vir-kato*, *virŝafo*, *virbovo...*, *satmanĝi*, *satripozi*, *satlabori*, *satdormi...*, *fin-konstrui*, *finlegi*, *finverki*, *finaŭskulti...*, *ludĉevalo*, *ludmeblaro*, *ludhundo...*

Kaj fine, vidante la bildon de bela **sun-floro**, provu kolekti almenaŭ dek vortojn kun *sun-*. De tempo al tempo mi rekomendas al vi fari similajn taskojn por ekzerci la cerbon.

Geza Kurucz

LUMA AMO

Muziko: *Vesa Pölkki*

Teksto: *Anja Karkiainen*



Nin ĉir - kaŭ - pre - nas sen - li - ma lu - mo. El



gran - da fla - mo ĝi dol - ĉa ve-nas. Se ni kon-sen-tas pri



ĉi bra - ku - mo, la mon - do e - ne en ni se - re - nas.

Nin ĉirkaŭprenas senlima lumo.
El granda flamo ĝi dolĉa venas.
Se ni konsentas pri ĉi brakumo,
la mondo ene en ni serenas.

La lumo al la anim' teneras,
karesas koron ĝi per radioj.
Okuloj sekve reflekte peras
ilian varmon en brilaj strioj.

De kor' al koro la strioj pontas.
Okazas, sen origin-proklamo,
ke kiam du tiaj sin renkontas,
ekflamas lumid-gefrata amo.

origino: estiĝ-loko / *proklami:* klare anonci / *reflekti:* resendi kun ŝanĝo de direkto / *serena:* tre trankvila / *tenera:* milda, sento-plena.

ANEKDOTO

En dimanĉa lernejo instruisto demandis al usona knabo:

– Kiu estis la unua homo?

– George Washington, – tuj respondis la knabo.

Kiam la instruisto diris, ke la unua homo estis Adamo, la knabo diris:

– Povas esti, se oni parolas pri ali-landanoj.

ENHAVO

Fortaj IIK-anoj	1	Longeco gravas (<i>Stefan MacGill</i>) ..	26
Gerda malaperis	2	Interkultura mondo (<i>E. Nadikova</i>)	
Zamenhof pri patriotismo	3	Internacia Lingva Festivalo	28
William Auld: Eklogo	4	LASTE. Simbolaj solvoj (<i>Hajni</i>) ...	32
Premiitoj en fabelkonkurso 2006 ...	5	Solvoj de antaŭaj enigmoj	33
Kial havas testudo kirason?	6	Krucenigmo (<i>Stefan MacGill</i>)	34
Helpanta mano (<i>J. Vas-Szegedi</i>) ...	7	Humuro (<i>Dieter Berndt, Saliko</i>) ...	36
Kion faras glacirompaj ŝipoj?	8	Esperanto kaj mi (<i>Geza Kurucz</i>)..	37
Birbal revenis hejmen (<i>Saranath</i>) .	9	Japanio (<i>Jasuo Hori</i>)	38
La sekreto de Aranka (<i>Pacheca</i>) ..	10	Frandaj esprimoj	40
Rebusoj (<i>G. Kurucz</i>)	12	Ilustrita frazeologio	41
Suno kaj nokto (<i>Tullia Spaggiari</i>) .	13	El nia historio - 3 (<i>Á. Rátkai</i>)	42
Glima (<i>Baldur Ragnarsson</i>)	14	Ĉu vi scias? (<i>Zoltán Kurucz</i>)	43
Vintraj sportoj (<i>J. Felszeghy</i>)	16	Hilda Dresen (<i>B. Ragnarsson</i>) ...	44
LUME. Denove pri uloj		Lingva doktoro (<i>Geza Kurucz</i>) ...	47
(<i>Monika Molnár</i>)	18	Kantul Luma amo	
LUDE. Alumeta alimeto (<i>smg</i>)	21	(<i>Anja Karkiainen, Vesa Pölkki</i>)..	48
Strangaj simboloj (<i>Hajni MacGill</i>) .	22	Enhavo. Kolofono	49
Sur mont' da spageto (trad. <i>smg</i>)	23	Kiel ni rolludas (<i>Karina MacGill</i>)..	50
Emil-Erni (<i>Stefan MacGill</i>)	24	Pri AKEL	52

Sen pied-notoj JUNA AMIKO uzas la plej oftajn 1500 vort-radikojn, kiujn vi trovas en nia hejm-paĝo: www.junaamiko.inf.hu aŭ en www.eo.lernu.net

Eldonanto de JUNA AMIKO: ILEI, Riouwstr. 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.
Redaktoroj: *Stefan MacGill* (Pannónia u.30.l.6, HU-1136 Budapest, Hungario, stefan.macgill@gmail.com) kaj *Géza Kurucz* (Hitel u.10.fsz.16, HU-6000 Kecskemét, Hungario, geza@banyai-kkt.sulinet.hu)
Lingva revizianto: *Baldur Ragnarsson* (Islando).
Kunlaborantoj: *s-ino Saliko, Anja Karkiainen, Vesa Pölkki* (Finnlando), *Elena Nadikova* (Rusio), *Neringa Žasaite* (Litovio), *Marie-Helene Desert* (Francio), *Jadranka Mirić* (Serbio), *s-ino Saranath* (Hindio), *Bardhyl Selimi* (Albanio), *Dieter Berndt* (Germanio), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Elizabeta Rajtmár, Zoltán Kurucz, Monika Molnár, Judit Felszeghy, Hajnal kaj Karina MacGill* (Hungario), *Marija Belošević* (Kroatio), *Michel Nkwiriye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *José J. Campos Pacheco* (Kubo), *Jasuo Hori* (Japanio), *Gian Piero Savio* (Israelo), *Nguyen Thi Ngoc Lan* (Vjetnamio).
Grafikistoj: *Pavel Rak* (Ĉeĥio), *Monika Molnár* (Hungario).
Komputila kolora tekniko: *János Bakk* (Hungario).
 Presita en **Presejo Saluton** (Gárdi Jenő u.14, HU-1047 Budapest, Hungario).
Administranto: *Stefan MacGill* (adreso supre) kaj *Anna Besenyei* (Hungario), retadreso: esperanna@gmail.com

ISSN 0230 1318

La sekva numero aperos en aprilo.

KIEL NI ROLLUDAS

Mi, mia fratino kaj aliaj geamikoj, fantazi-ŝatantoj, ofte renkontiĝas por rolludi. Ni ĝuas la ludon dum horoj... aŭ eĉ tra kelkaj tagoj, kiam ni havas sufiĉan tempon. Kutime ni ludas kun du ĝis ses amikoj. Gravas bone harmonii en la grupo.

Niaj rolludoj estas improvizataj rakontoj kun pluraj verkantoj, kiuj ĉiuj havas siajn proprajn rolojn. Ni interagas spontane – sed nur parole; ni ne aktoras. Unu el ni akceptas la ĉefan rolon, nome: tiun de la rakontanto. Ties tasko estas zorgi pri la amuzo de la aliaj pere de imagita mondo. La roluloj kune decidas siajn rolojn kaj la specon de la rakonto. Laŭ tio, la rakontanto difinas la situacion kaj cirkonstancojn kaj poste reagis al la diroj kaj agoj de la ceteraj rolantoj.

La rolludo estas kutime lokita en imagita mondo, kio dependas de la rakontanto. Li aŭ ŝi devas plenumi ĉiujn kromajn (ne disdonitajn) rolojn bezonatajn. La rakontanto devas esti preta solvi aŭ trakti konfliktojn kaj kverelojn, sed kelkfoje li / ŝi mem devas kaŭzi ilin, por igi la fluon de la rolludo pli interesa. En malfacilaj kazoj, la rakontanto devigas al rolulo ĵeti ĵet-kubon, por decidi ĉu la stranga peto estos permesata aŭ ne.

Sur la apuda paĝo la bild-strio kiun mi verkis kaj desegnis montras tipan komencon de rolludo. En la sekva numero mi klarigos pli, tiel ke vi mem povu ekludi. Se vi jam rolludas aŭ volas ekscii pli, kontaktu min ĉe: *avren@freemail.hu*. Se estos sufiĉa interesiĝo, ni povos funkciigi retan rolludadon en Esperanto pere de babilejo.

Karina MacGill, Hungario

Memoru reaboni por 2007!

Nia revuo aperos trifoje, same kiel nun, kaj kun la sama abonprezo.

Uzu la aldonitan varbilon por konvinki viajn amikojn!

	1 ekz.	ekde 3
Tarifo 1	€ 14	po € 11
Tarifo 2	€ 9	po € 7

VORTKLARIGOJ

aktori: preni rolon.

babili: paroladi

cirkonstanco: kunteksto, serio de eventoj

difini: precizigi

fantazio: granda imag-povo

kaŭzi: ekigi

konflikto: kunpuŝiĝo, malpaco, bataleto.

kontakti iun: preni ligon kun iu

roli: surprizi iun personecon

(ekz. en teatro)

situacio: okazaĵo kaj ĝia kunteksto

spontana: laŭ emoj, ne planita

tipa: kutima, karakteriza



Ni rolludu! Mi estos la rakontanto.

Jes.

Artur, ĉu vi prenos vian kutiman rolon?



Hajni, kiun rolon vi prenos?

Bona ideo. Kio estos via nomo?

Mi estos juna magisto, kiu vojaĝante evoluigas siajn kapablojn.



Bah! Vi simple ne povis eltrovi konvenan nomon!

Ne moku ŝin, sinjoro Sennom!

Mi almenaŭ havas nomon!

Sennom? Ĉu vi nomas tion nomo?



Mia nomo estas sekreto kiun neniu iam ekscios!

Kaj vi Matyi, kion vi ŝatus?


Mi volas esti duon-drako, duon-urso. Ho, ĉu mi povas havi krome flugilojn? Eble kvar? Kaj kapablon eksplodigi kion ajn, kion mi rigardas? Ĉu mi rajtas...?

Ĵetu!

Bone!

Silentu kaj ĵetu.

Se mi sukcesos, mi eksplodigos ĉion kaj ĉiun...



Kvin! Ĉu mi sukcesis? Ĉu kvin estas ĝusta?

Ne.



Ve. Kion mi devintus ĵeti por sukcesi?

Naŭ.



Tio ne eblas! La ĵet-kubo havas nur ses flankojn.

Mi scias!

Ne forgesu: La rakontanto ĉiam pravas!

Jen kelkaj geknaboj el la partoprenintoj de la ĉi-jara AKEL.

De la 14a ĝis la 21a de aprilo okazos la kvara renkontiĝo inter la partneroj de la projekto "Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj", subtenata de Naciaj Agentejoj "Sokrates".

La partoprenantoj renkontiĝos en urbo Polski Trambesh, Bulgario. La organizantoj invitas ĉiujn instruistojn, kiuj interesiĝas pri la projekto, veni en Bulgaron.

Por pliaj informoj turnu vin al Mariana Gencheva: maries972@yahoo.com.

